koncentrejoj, kaj lia filo, Adamo, estis mortpafita. El lia idaro saviĝis nur lia eta nepo, kun ties patrino, kiu por eskapi el la nazia persekutado, ŝanĝis sian familian nomon de Zamenhof al Zaleski. Menciindas ke vivas ankoraŭ nuntempe tiu nepo de L. L. Zamenhof kaj havas du filinojn.
Milionoj da viktimoj kaj granda regreso de homa kaj kultura vidpunko estis la heredaĵo de tiu nigra periodo por la mondo kaj speciale por Eŭropo. La fiasko de la paco, de la kulturo kaj de nia esperantista afero povas esti esprimita per tiu kantteksto verkita de nia samideano Alcibiades González Meana, imitante la esperantistan himnon sed kun mala senco kaj titolo: **LA MALESPERO**, kiun ni aperigas ĉi-paĝe.

## LA MALESPERO

**En la mondon venis malkontento,**
**Tra la mondo iras sanga ŝoko.**
**Pro fiagoj de nehoma gento,**
**Nuna vivo ŝajnas kruda moko.**

**Ve! Al bombo korpojn kreviganta**
**ĝi la homan tiras familion.**
**Al la mond' senĉese batalanta**
**ĝi permesas daŭre la defion.**

**Sur ĥaosa lingva fundamento,**
**malfidante unu la alian,**
**la popoloj vivas en turmento**
**vivon mornan, tedan, anarkian.**

**Forte staras firmigitaj baroj**
**inter la popoloj dividitaj.**
**Kaj persistos ili dum miljaroj,**
**de tenaca stulto subtenitaj!!**

Se **LA ESPERO** estis verkita en epoko de optimismo kaj favora vento, la epoko kiun ni priskribas nun inspiris tian pesimisman senton.
Jes, oni povas temi pri regreso ankaŭ de lingva vidpunkto. Ne estis nur ke la paco, kiel esperantista idealo, troviĝis en sia plej malfavora situacio. Estas ankaŭ la fakto ke la lingva solvo al la mondaj problemoj fariĝas fakte dumlonge ne aplikebla. Eble la tiamaj esperantistoj ne perceptis tion, sed Esperanto estis kreita en Eŭropo por Eŭropo, pensante kaj kalkulante je Eŭropo. Kaj la venko en tiu monda milito neniel povus esti venko de Eŭropo. Japana venko ne alportus avantaĝon al Eŭropo kaj al Esperanto. Germana venko estus venko de rasisma kaj ŝovinisma gento kiu amas nur sin mem, ne Eŭropon kaj Esperanton. La alternativa venko, kiu konkretiĝis, alportis avantaĝon nur al Usono kaj Rusujo, kiuj havis sian propran kulturan areon kaj influon kaj ne bezonas Esperanton. En Eŭropo rompiĝis por ĉiam, favore al la angla lingvo, la idioma kaj kultura ekvilibro kiu iam postulis neŭtralan komunan lingvon kaj konstituis ŝancon por Esperanto.
Sed ĉi tiuj prikonsideroj eblas nur nun, vidate de la perspektivo de la tempo pasinta de tiam. La tiamaj esperantistoj zorgis pri la tiamaj problemoj.

Grava tiama problemo de la **Universala Esperanto Asocio** estis tio ke la venko de la Hitlera diktaturo en Germanio okazigis la perdon de multe da membroj en tiu lando tradicie forta de esperantista vidpunkto. Dume ankaŭ en la Sovetunio regata de Stalin la esperantistoj suferis persekutadon, sed tie **UEA** havis tre malmultajn membrojn.
Alia problemo estis tio ke kiam la estraro de **UEA** decidis en la jaro 1936 translokigi la asocian sidejon de Ĝenevo al Londono, protestis grupo da svisaj membroj pro ne adekvata proceduro. Iu svisa tribunalo pravigis ilin. Okaze de tio okazis en la monda esperantistaro ia skismo, disdividiĝo. Multaj aktivaj membroj kaj kelkaj landaj asocioj forlasis la **Universalan Esperanton Asocion** kaj fondis apartan organizaĵon: **Internacia Esperanto-Ligo (IEL)** kun ties nova presorgano **Esperanto Internacia**. Kelkaj, malmultaj, restis en la tiel nomata **ĝeneva UEA**, kiu plu havis kiel presorgano la revuon **Esperanto**. La skismo daŭris kelkajn jarojn, konkrete ĝis la jaro 1947, jam post la finiĝo de la mondmilito. Tiam reunuiĝis ambaŭ internaciaj esperantistaj organizoj sub la tradicia nomo de **Universala Esperanto Asocio**.
Sed tio estis organizaj problemoj kiuj ne nepre respegulas la staton de la movado. Ĉi-kaze la veraj problemoj de la esperantista movado estis pli gravaj ol ties de ĝia organiza strukturo. Fakte, dum la jaroj de la skismo, pli grave ol la skismo mem estis tio ke preskaŭ ĉiuj landaj asocioj havis, pro la problemoj de la milito, preskaŭ nulan esperantistan aktivadon.
Ĉar ni pritemas la historion de la esperantista movado je loka, urba kaj regiona nivelo, ni devas memori ke pro la postmilitaj cirkonstancoj de nia lando, la movado malaperis, same ol en la cetero de Hispanio, en kio koncernas al la organiza aspekto. Sed kvankam ankaŭ forpasis kelkaj gravaj membroj de la astura esperantistaro, restis tamen personoj pretaj reorganizi la esperantistan aferon kiam la cirkonstancoj pliboniĝus.